

Esperanto kaj UN

Informilo de la oficejo de UEA por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 81, marto-aprilo 2026



Universala Esperanto-Asocio

Esperanto en la Ĝenerala Konferenco de Unesko

La 43-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo de Unesko okazis de la 30-a de oktobro ĝis la 13-a de novembro 2025 en Samarkando, Uzbekio, kunigante reprezentantojn de preskaŭ ĉiuj 194 membraj ŝtatoj. Dum du semajnoj, la delegitoj diskutis pri edukado, scienco kaj kulturo en regiono simbolanta la Silkan Vojon kaj interkulturan dialogon. La eventon partoprenis sep-persona delegacio de Universala Esperanto-Asocio, inter ili Esplor Kasati, el DR Kongo. En raporto verkita por *esperanto-afriko.org*, li rakontis pri la aktivaĵoj, kiujn faris la UEA-delegacio surloke en Samarkando. Jen resumo:

Dum dek kvin tagoj en Samarkando, grava historia urbo de Uzbekio laŭ la Silka Vojo, renkontiĝis pli ol 4500 personoj el kiuj diplomatoj de membraj ŝtatoj de Unesko kaj



reprezentantoj de neregistaraj organizoj, kadre de la 43-a Ĝenerala Konferenco de Unesko. Universala Esperanto-Asocio estis reprezentata de internacia delegacio, kiun konsistigis Mireille Grosjean (Svislando), François Lo Jacomo (Francio), Ningna Wei (Ĉinio), Nathalie Kesler (Francio), Esplor Ngoma Kasati (Demokratia Respubliko Kongo), Max Garcia (Hispanio), kaj Shah-Ahmad Mutalov (Uzbekio).

Dum la konferenca periodo, nia laboro estis: disdoni informilojn per kiuj ni reklamas la 26-an de julio kiel Mondan Tagon de Esperanto; kontaktiĝi kun diplomatoj reprezentantaj membrajn ŝtatojn de Unesko; kontaktiĝi kun reprezentantoj de aliaj neregistaraj organizoj (NRO-j) kun la celo informi ilin pri la problemo de lingva diskriminacio kaj la graveco de Esperanto kiel faciligilo de internacia komunikado, kaj varbi ilian subtenon favore al la Internacia Lingvo Esperanto – lingvo parolata de civitanoj el preskaŭ ĉiuj iliaj landoj.

Dum tiu ĉi Konferenco la svahila estis nomata oficiala laborlingvo de la Ĝeneralaj Konferencoj de Unesko. Dum la debato pri ĝenerala politiko Mireille Grosjean parolis nome de la delegacio de UEA, alvokante la membrajn ŝtatojn konsideri la gravecon kaj utilecon de Esperanto por

internacia interkomunikado kaj interkulturaj interŝanĝoj inter la popoloj de la tuta mondo. Ŝi menciis du rezoluciojn per kiuj Unesko agnoskis la valoron de Esperanto, en 1954 kaj 1985. Same kiel la svahila lingvo transiras limojn de orienta Afriko (ŝi diris), Esperanto transiras limojn tutmonde. Ni Esperanto-parolantoj havis du rekomendojn por Unesko: rekoni la 26-an de julio kiel Mondan Tagon de Esperanto kaj enskribi Esperanton sur la liston de ne-materiaj heredaĵoj. Ŝi menciis ankaŭ du prioritatojn de UEA: komunikadon en Afriko kaj la situacion de virinoj tra la mondo. UEA jam kunlaboras kun Unesko pri la Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj kaj pri la rolo de lingvoj en edukado.

Interesis multajn homojn la fakto, ke malsamkontinentanoj formis delegacion en kiu ĉiuj membroj estis el malsamaj landoj kaj povis interkompreniĝi per Esperanto. Dum la restado en Samarkando, la delegacio renkontis lokajn Esperanto-parolantojn, kaj almenaŭ unu parolanton de Esperanto el inter la interpretista stabo de la Konferenco. Prezentita al la delegacio estis nova libro de Anatolij Lonesov pri la historio de Esperanto en Centra Azio. La fortigo de kontaktoj inter Unesko kaj UEA daŭras sub la gvido de estrarano de UEA François Lo Jacomo.

Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, la 21-a de februaro 2026

Universala Esperanto-Asocio estas firma subtenanto de la rajto lerni kaj uzi gepatrajn lingvojn, interale por eviti diskriminacion kontraŭ minoritataj lingvoj favore al tiuj de la majoritato. Tro ofte, la rezulto de tia diskriminaciado estas limigo de la partopreno de minoritatoj en la nacia kaj internacia vivo, kaj la subpremo de politika kaj kultura vivo.

En sia mesaĝo okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, la 21-an de februaro, UEA atentigis, ke tiu speciala tago “originas el la lukto por la rajto uzi la gepatran bengalan en 1952 en la tiama Orienta Pakistano, nun Bangladeŝo.” La tago memorigas nin, UEA deklaris, “ke lingvo estas grava parto de identeco de popoloj kaj komunumoj: lingvoj transdonas tradiciojn, sciojn kaj historion. Kaj infano, kiu eklernas per la propra denaska lingvo, lernas plej facile kaj digne.”

“Por antaŭenigi fortajn komunumojn, oni bezonas antaŭenigi multlingvismon. Ĉiu homo rajtu lerni kaj kreski per sia gepatra lingvo, kaj ankaŭ akiri regionajn kaj naciajn lingvojn, kaj internaciajn lingvojn. Per multlingvismo, saĝe utiligata, ĉiu persono povas partopreni, paroli kaj esti aŭdata. Sekve, ĉiuj povas kune decidi pri komuna estonteco.”

La mesaĝo atentigis, ke “multlingva mondo bezonas multlingvan edukadon kaj multflankismon. Tio estas vojo al paco kaj justeco, al daŭripova evoluigo, kaj al realigo de la celoj de Unuiĝintaj Nacioj: paco, homaj rajtoj, internacia kunlaboro kaj amikaj rilatoj inter nacioj kaj popoloj. Lingva justeco postulas kreadon de medioj, kie ĉiuj lingvoj kaj voĉoj estas valoraj kaj havas spacon por ekzisti kaj prosperi, en digno kaj egaleco... Por savi la kulturen diversecon de la mondo, ni savu ankau la lingvan diversecon.”

“Universala Esperanto-Asocio, ekde sia fondiĝo en 1908 laboras por antaŭenigi internacian komunikadon, komprenon kaj estimon inter popoloj. Pere de la internacia samrajtiga lingvo Esperanto, ni proponas interkomprenon inter homoj, tiel ke ĉiu homo rekonu unu la alian en sia homeco, kaj kunvivu harmonie kaj pace.”

En sia mesaĝo UEA krome notis, ke “ni baldaŭ atingos la mezan punkton de la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj (2022-2032), kiu interalie celas konservi kaj fortigi la lingvajn homajn rajtojn de indiĝenaj popoloj, kaj garantii ke ili povas konservi, fortigi kaj disvastigi siajn lingvojn.”

La ĉiujara Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Montrealo en aŭgusto 2022, havis kiel ĉeftemon “Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj,” markante la lanĉon de la speciala jardeko. La Kongreso de 2026 okazos en Graz, Aŭstrio, de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 2026, kaj aparte traktos volontuladon en la servo al daŭripova evoluigo.

Internacia Virina Tago 2026

Sub gvido de la Virina Komisiono de UEA, la Asocio pretigis mesaĝon okaze de la Internacia Virina Tago 2026, la 8-a de marto. Salutante virinojn kaj knabinojn tra la mondo UEA “reasertas sian engaĝiĝonantaŭenigi genran egalecon kaj virinajn rajtojn, kunlabore kun aliaj civilsociaj organizoj kaj internaciaj partneroj.”

“Ĉi-jare la temo de Unuiĝintaj Nacioj por la Internacia Virina Tago — **Rajtoj. Justeco. Agado. Por ĈIUJ Virinoj kaj Knabinoj.** — substrekas, ke egaleco postulas konkretan agadon. Por atingi veran justicon por ĉiuj, necesas forigi ĉiujn barojn al egala justeco: diskriminaciajn leĝojn, malfortajn aŭ neefikajn jurajn protektojn, kaj damaĝajn praktikojn kaj sociajn normojn, kiuj subfosas la rajtojn, sekurecon kaj dignon de virinoj kaj knabinoj.”

La mesaĝo aparte atentigas pri lingvaj demandoj: “UEA atentigas ankaŭ pri la graveco de lingva justeco. Por ke virinoj kaj knabinoj povu plene partopreni en la politika, ekonomia kaj kultura vivo, ili bezonas egalan aliron al lingvaj rimedoj — inkluzive de edukado en la gepatra lingvo kaj aliro al pliaj lingvoj por internacia komunikado. Lingva malegaleco plifortigas aliajn formojn de malegaleco. Per la Internacia Lingvo Esperanto kaj ĝia tutmonda reto de parolantoj, la Esperanto-movado kontribuas al pli inkluziva internacia dialogo kaj al pli forta voĉo de tutmonda civila socio, inkluzive virinojn kaj knabinojn.”

“Genra egaleco kaj plena partopreno de virinoj en ĉiuj sferoj de la vivo,” la mesaĝo deklaras, “estas esencaj por justa kaj daŭripova evoluo. Sen efektiva aliro al justico, edukado, informo kaj decidprocezoj, rajtoj restas nur deklaroj surpapere.”

Resume kaj emfaze: “UEA alvokas ĉiujn koncernajn instancojn agi decide kaj kun respondeco, por ke ĉiuj virinoj kaj knabinoj — sen escepto — ĝuu plenajn rajtojn, egalan protekton kaj realajn ŝancojn disvolvi sian potencialon.”

La Esperanto-gazetaro: Internacia interŝanĝo kaj vigla debatado

Foje ni devas memori niajn geamikojn en neregistaraj organizoj kaj en UN, ke la internacia Esperanto-komunumo havas vigan gazetan medion – kaj ĉiam havis, ekde la komenco antaŭ preskaŭ unu kaj duona jarcentoj. Universala Esperanto-Asocio aperigas monatan revuon, *Esperanto*, kaj ĝiaj kunlaborantaj fakaj asocioj proponas gamon da eldonaĵoj, kiel ankaŭ la naciaj Esperanto-asocioj. Aliaj revuoj estas plene sendependaj. La januara numero de *Esperanto* enhavas raporton pri la agado de la sepmembra delegacio de UEA en la lastatempa sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Samarkando, Uzbekistano. Gvidis la delegacion estrarano de UEA François Lo Jacomo, kun membroj el Svislando, DR Kongo, Uzbekio, Ĉinio, Francio kaj Hispanio.

La plej lasta numero de *Etnismo*, redaktita en Hispanio, proponas artikolojn pri la kenja verkisto Ngugi wa Thiongo, indiĝenaj popoloj argentinaj, la estonteco de la irlanda lingvo, kaj nekrologon pri Uwe Joachim Moritz, el Germanio, kiu fondis la revuon en 1972.

IPR: Internacia Pedagogia Revuo de januaro 2026, raportas pri planoj por la 59-a monda kongreso de Esperanto-instruistoj, kiu okazos venontan julion en Zaozhuang-universitato, Ĉinio, kaj ankaŭ prezentas aldonan perspektivon pri la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Samarkando.

Kunlabore kun Ĉina Esperanto-Ligo, UEA helpas en produkto de *Kuriero de Unesko* en Esperanto, presite kaj rete. Lastatempa numero prilumas mondan varmiĝon, per artikoloj pri la Monto Kilimanĝaro, Centra Azio, indiĝenaj tradicioj, kaj glaĉeroj en Norvegio.

La numero de *Monato* de januaro 2026, eldonata en Belgio, enhavas profilon de la novelektita japana ĉefministriro Takaichi Sanae, plus artikolojn pri diplomaciaj iniciatoj en Okcidenta Saharo, evoluoj en Venezuelo, kaj aliajn mondajn novaĵojn. Dume, la junulara revuo *Kontakto* rigardas al brazilaj filmoj, ombra teatro, junularaj trejnadaĵoj organizataj de la junulara organizo TEJO en Hungario, kaj aliaj evoluoj inter la Esperanto-junularo.

Per tricento da paĝoj, duobla numero de *Beletra Almanako* (februaro-junio 2025) proponas vastan gamon da originalaj kaj tradukitaj poemoj kaj prozo en Esperanto. Tri artikoloj fokusiĝas al la hungara utopia romanverkisto Sándor Száthmari (kiu verkis en Esperanto) okaze de la kvindeka jaro post lia morto – inkluzive de anonco pri publikigo de ĝis nun ne eldonita romano. Wang Chonfang kaj Wei Yida traktas tradukadon de ĉina klasika poezio en Esperanton, kaj Marc van Oostendorp rakontas pri lastatempe eltrovita kolekto de leteroj en Esperanto interŝanĝitaj de nederlanda maristo kaj lia itala amatino en amafero disŝirita de la Dua Mondmilito kaj la kresko de faŝismo.

La aprila-junia numero de 2025 de *Sennaciulo* pritraktas teknologiojn kaj socion per la demando ĉu senpapera socio estas ekologie tiel akceptebla kiel la socio, kiun ĝi anstataŭas. Ĝi enhavas ankaŭ raportojn pri la kongreso de 2015 de SAT, la Sennacieca Asocio Tutmonda.

Kaj tio, kiel oni diras, estas nur selekto.

Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto-Asocio, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017. [1] 212-687-7041. www.esperantoporun.org.